

## **ILEI raportas**

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri trimonata agado, de 2019-07-15 ĝis 2019-10-15.

### **Vivo de la Ligo. Eventoj**

#### **70-jariĝo de ILEI. Grava jubileo**

***LA 12-AN DE AŬGUSTO ILEI FESTIS SIAN FONDOTAGON. LA LIGO IĜIS SEPDEKJARA, TAMEN ĈIAM JUNA KAJ AKTIVA! NI FESTU KUN ĜI KAJ AGU POR ĜI!***

La Prezidantino Mireille Grosjean dissendis tra kanaloj de ILEI gratulmesaĝon kun listo de kelkaj gravaj atingoj de la Ligo en la lastaj jaroj.

#### **La Estraro**

Septembre-oktobre okazas tre detala diskuto pri la eldono de la prelegaro de la Tria Tutmonda Kolokvo en Neuchâtel kaj La Chaux-de-Fonds, Svislando, en 2015. Estas planata libreto aŭ KD. Tiu dosiero iros al ĉiuj 11 prelegantoj, al kvar bibliotekoj (laŭ la programo de ILEI “Ni Savu Niajn Semojn” – NSNS) kaj al la arkivejo de ILEI en Herzberg-am-Harz, Germanio. Eldonkvanto kaj formo ankoraŭ ne deciditaj; enretigo decidita.

Survojas diskuto ene de la Estraro pri aĉeto de ISBN por ILEI, por ke la Ligo povu mem eldoni kaj havi tiujn internaciajn normigitajn numerojn. Estis aĉetitaj 100 numeroj. Tiu paŝo estas postulo de niaj prelegantoj, kiuj per ĝi povos valide mencii siajn publikaĵojn en la diversaj bibliografioj.

La 21-an de septembro la Prezidantino Mireille Grosjean sendis alvokmesaĝon al ĉiuj ILEI-membroj rilate al la Internacia Tago de PACO. La 5-an de oktobro ŝi sendis inspiran mesaĝon al ĉiuj ILEI-anoj, instruistoj, okaze de la Tutmonda Tago de INSTRUISTOJ.

Fine de la Kongreso en Serbio Radojica Petrović anoncis, ke pro sankialoj li ne povas plu zorgi pri niaj kongresoj. Post tio li restas estrarano de ILEI kun rolo en la kampo de universitata agado kaj, kunlabore kun Germain Pirlot, en flegado de rilatoj kun AEDE. Li ankaŭ ricevis taskon reprezenti la Ligon ene de la Eŭropa Komisiono de UEA. La organizadon de la Kongreso 2020 en Kebekurbo, Kanado, prizorgas nun nia kasisto William Harris kaj nia prezidanto Mireille Grosjean. W. Harris iris en septembro al Kebekurbo, vizitis la kongresejon kaj kunsidis kun la Loka Kongresa Komisiono. Ni estas tre kontentaj inter aliaj aspektoj pri la kunlaboro tie kun Suzanne Roy.

## **La Komitato**

Septembre estis rete diskutita la protokolo de la komitatkunsido en Ĉaĉak. La Komitato rete aprobis la dokumenton. La Komitato rete aprobis la modifojn de la Regularo pri Honoraj Membroj. Pro la manko je kvorumo en Ĉaĉak sinsekvas nun diversaj decidoj per la Reto por nia plej alta instanco.

## **Kapabligo**

### **EIT – Esperanto-Instruista Trejnado**

Aŭguste pere de la Prezidantino kaj ekzamenotoj estis ellaborita detala plano por organizi EIT-ĉeestan staĝon en Bujumbura, Burundo, dum kaj post la 7-a Afrika Kongreso. Septembre okazis diskuto kaj voĉdono por la buĝeto de EIT en Bujumbura. Aktive partoprenis, unuavice, du estraranoj pri financoj: la kasisto William Harris kaj la vickasistino Karine Arakelyan.

## **Kongresoj**

### **La 52-a ILEI-kongreso en Ĉaĉak, Serbio**

La Kongreso en Ĉaĉak disvolviĝis tute bone kaj proponis multajn diversajn prelegojn, kursojn, kunsidojn kaj ekskursojn. Okazis Lingva Festivalo kaj jubilea Ludvespero pri la Historio de ILEI kaj de la Movado ĝenerale. Notindas la malalta nombro de partoprenantoj: proks. 60, kontraste kun la antaŭaj jaroj. Notindas, ke el aliaj balkanaj landoj la najbaraj esperantistoj ne venis. La Kongresa Libro ne aperis, ankoraŭ ne.

Meze de oktobro estas preskaŭ finpreta la trilingva (Esperanto, serba kaj angla) Libro de Resumoj "Edukado en Virtualaj Komunumoj" pdf-forma kaj kun ISBN, pri la tre sukcesa Konferenco en la fakultato en Ĉaĉak. Pri tiu eldonado okupiĝas la estrarano Radojica Petrović. Daŭras laboro pri financa finkalkulado de la kongreso. La LKK-kasisto Aranka Laslo estas finpretiganta raporton pri la spezoj en Ĉaĉak.

### **Postkongresaj novaĵoj**

La Estraro ĝoje ekscias, ke en UNED, la ŝtata universitato de malĉeesta edukado en Madrido, kie ni kongresumis en 2018, disvolviĝas Esperanto-kurso. Enskribiĝis 50 lernantoj, 20 el kiuj ekzameniĝis en junio 2019 kaj preskaŭ ĉiuj sukcesis.

## **Venontaj kongresoj**

### **La 53-a ILEI-Kongreso en Kebekurbo, Kanado.**

Survojas la preparlaboro por nia sekva kongreso en Kanado. La Estraro estas konstante en rilato kun LKK. Estis diskutita kaj voĉdonita kotiztabelo. Ĉiuj informoj pri la kongreso aperos en IPR/4 kaj sur la ĉefpaĝo de [www.ilei.info](http://www.ilei.info). Estis interkonsentite, ke la Prezidanto de UEA Prof. Duncan Charters faros la enkondukan prelegon pri la kongresa temo "Interlingvistiko en universitatoj". Jam komenciĝis preparado de la programo.

## **La 54-a ILEI-Kongreso en 2021, kie?**

Daŭras esploro pri la loko por la 54-a ILEI-kongreso en 2021. Ni scias, ke UEA kongresumos en Belfast, Unuiĝinta Reĝlando. Unuaj neformalaj kontaktoj okazas inter la ILEI-prezidanto kaj esperantistoj en Edinburgo. Temas pri la sama ŝtato, kio estus avantaĝo por tiuj, kiuj devus obteni nur unu vizon.

## **Internacia Pedagogia Revuo (IPR)**

Septembre estis anoncita pere de la Prezidantino Mireille Grosjean la nova ritmo por sendado de IPR, kiu devos kongrui kun la kalendara jaro: la abonkotizoj alvenu al la kasisto ĝis la 15-a de januaro de la jaro 2020 por la jaro 2020. Post kontrolo de la pagoj la kasisto informas Sebastian Cyprich, kiu liveros la adresslipojn al la presisto, por ke ĉiuj pagintaj membroj ricevu la unuan numeron de IPR de la koncerna jaro kaj la tri sekvajn.

Se iu persono volas iam tra la jaro membriĝi en ILEI, la persono per pago akiras la avantaĝojn de membreco por la tuta jaro : tio estas rabatoj por la kongreso k.s. Plie la Estraro informas la personon : ILEI ne garantias la sendadon de la paperaj revuoj de la jarkomenco. ILEI povas liveri la revuojn de la jarkomenco rete.

La pli ampleksa numero de IPR-4 survojas diligente kaj iras hodiaŭ la 15-an de oktobro al la presejo. Ĝia redaktoro proponis, ke varbcele ĝi estu rete alirebla libere. La Estraro subtenas tiun ideon. Tio estos, espereble, la unua paŝo kaj provo en la vojo al la solvo de la financaj problemoj pri ILEI-organoj.

## **Juna Amiko (JA)**

Daŭras aktiva esploro pri deficino de JA. Jam estas ĝustigitaj la nomlisto de pagintoj kaj laŭlanda statistiko. La redaktoro Stano Marcek kaj la skipo de rubrikestroj diskutas pri adapto de la enhavo. La Estraro kaj anoj de la koncerna laborgrupo pritaksas diversajn proponojn rilate al eblaj solvoj por mildigi la financon deficon pri la revuo. La komisiito de ILEI Stefan MacGill proponis, cele al pli aktiva varbado, ke estu du perantoj por JA en Hungario: ILEI-HU (nur superaj membrecoj) kaj li (ĉefe memstaraj abonoj de nemembroj de ILEI). Estas planata vasta varbkampanjo kaj verkado-desegnado de anoncoj por movadaj gazetoj kaj revuoj.

## **ILEI en la Reto**

Laŭ la adreso

[https://www.youtube.com/channel/UCvxZ3qhmQcFKzTGCR\\_SLHFg](https://www.youtube.com/channel/UCvxZ3qhmQcFKzTGCR_SLHFg) ĉe Youtube funkcias kanalo Esperanto + Edukado ILEI, kie eblas sekvi agadon de la Ligo kaj edukajn temojn ĝenerale. ILEI esprimas koran dankon al la brazila sekciestro Aristophio Alves Filho, kiu konsentis prizorgi la kanalon, per sia helpo nutri tiun kanalon per filmoj pri la koncernaj temoj. La Estraro invitas ĉiujn viziti tiun paĝaron kaj aktive kontribui.

La retejo [www.ilei.info](http://www.ilei.info) daŭre provizas ĉiujn per aktualaj informoj kaj aperigo de regularoj, artikoloj kaj raportoj. Ĉu vi jam legis ĉion en tiu paĝaro?

## **Kunlaboro kun UEA**

En Finnlando okaze de la UK elektiĝis ĉe UEA nova prezidanto Prof. Duncan Charters, kiu estis prezidanto de ILEI. Kompreneble la Ligo tre ĝojas pri tiu nomumado. En la nova taskodivido ene de la Estraro de UEA Prof. Charters estas la observanto ĉe ILEI. Ankaŭ pri tio ni tre ĝojas.

Aŭguste la nederlanda sekcio de ILEI proponis alvoki UEA-n por jena projekto: UNESKO kolektu, traduku kaj eldonu ĉefverkojn de minacataj aŭ forpelitaj indiĝenaj popoloj en la espero, ke pliigita literatura prestiĝo altigos ilian ŝancon – per la premo de la monda publikopinio – efektivigi siajn teritoriajn rajtojn kaj postulojn, almenaŭ je adekvata kompensa vivotereno, konforma al iliaj tradicioj. Ĉar UEA estas akreditigita NRO ĉe UNESKO kaj ILEI estas nur observanto, ILEI transdonis la proponon al UEA kun la espero, ke io povos konkretiĝi kaj realiĝi.

### **Kunlaboro kun TEJO**

La Estraro de ILEI estas en kontakto kun la nova Estraro de TEJO rilate al onta kunlaboro.

### **Kontaktoj kun aliaj enmovadaj institucioj**

Okaze de UK en Finnlando la prezidanto de ILEI Mireille Grosjean kaj la prezidanto de **LIBE** Nedeljka Lozajic subskribis kunlaboran interkonsenton inter la du Ligoj okaze de LIBE-kunveno en la kongresejo. Ratifiado fare de la Estraro sekvos.

Aŭguste la Prezidantino Mireille Grosjean sendis alvokmesaĝon al la Prezidanto de **ISAE** pri ebla kunlaboro.

Mireille Grosjean estas en daŭra kontakto kun la prezidanto de **UMEA** D-ro Christoph Klawe.

La prezidanto sendis salutmesaĝojn al HORI Yasuo, kiu de dek jaroj organizas legigan programon “Esperanto-Sumoo” kun arda persistemo. Gratulojn! Ŝi sendis salutmesaĝon al Japana Esperanto-Instituto pro centjariĝo. Gratulojn! Ŝi salutis per kuraĝiga mesaĝo la kolegojn en Budapeŝto, Hungario, okaze de ilia kunveno, same la kolegojn de Skotlando okaze de ilia kunveno.

### **Dankoj**

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo, ricevu elkorajn dankojn!

Sekretario de ILEI:

Elena Nadikova

Prezidanto de ILEI:

Mireille Grosjean

2019-10-15